# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 01/07/2021 Kvincenttrideksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)

## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute **808,000** lernantoj <u>nun</u> studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **278,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **229,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **204,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **97,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde septo 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).

N.ro 41 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:




1). En "Dum la dek minutoj, dum kiuj li manĝis, la tuta torto malaperis." troviĝas suborda frazo.

A). Ĉe kiu frazparto (= part of speech of the main clause) apartenas la subfrazo?

B), Kiu vorto en la subfrazo reprezentas (ripetas) "la dek minutoj"?

C). Kio estas la gramatika subjekto de la ĉeffrazo?

2). En la frazo "Li ĉiam estis fidela amiko", kiel nomiĝas la frazparto "estis fidela amiko"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 537. *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**



Financado de la produktado de filmetoj **Esperanta Retradio** **24a Junio 2021**

# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.




## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La kunveno de la 3a de julio estos nuligita de pro virusaj reguloj.

Ĉu vi sciis? Nur dek du homoj iam promenis sur la luno, kaj ĉiuj faris tion en kvarjara periodo inter 1969 kaj 1972.



## Antaŭe estis



Armeoj estis por la defendo kontraŭ pli malfortaj fremdaj invadantoj.
Policistoj estis por helpi la loĝantojn vivi pace laŭ la reguloj de la socio.

## Nun estas

Armeoj estas por helpi ke via lando restu riĉa per ŝtelo de oleo, mineraloj, ktp kaj detruu iun ajn ideon kiuj povus anstataŭi aŭ pli bonigi nian "perfektitan societon"



Policistoj estas por silentigi civitanajn grupojn kiuj kritikas nian "perfektitan societon"

Antaŭe en Aŭstralio sen laboraj subvencioj, malsanaj helpoj, ktp nuligis la necesojn por ŝteli por la vivo. Do oni povis eliri la domon sentime iam ajn.
Universala enspezo nuligos la plej multajn krimojn kaj la neceson havi militajn policojn.

**Senhavaj homoj ŝtelos, oni ne malsatmortas en paco.** *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# OMAĜO AL OWEN WILLIAM LONERAGAN (1924-2021)





Ĉe lia funebra ceremonio ridetis al ni foto de bela junulo en aerarmea uniformo. Estis 1942 kiam 18 jara Owen rekrutiĝis en la aŭstralian armeon, kaj tre baldaŭ poste en la aerarmeon. Li estis sendita al Anglio, de kie, en 1945, li servis dum la 2-a Mondmilito kiel aerarmea radio-gvidanto, flugante super Eŭropo. Li travivis 26 tiajn misiojn, post kiuj, kiam feliĉe preta kaj atendanta hejmeniri, li trovis necese fari 16 pliajn. Do, entute, 42. Je la tago de la militofino, Owen estis la sola el sia misiono-kunularo kiu ne supreniris en la aviadilo por lasta, ĝoja, akrobata flugo. Bedaŭrinde, oni ne replenigis la brulaĵon tiun matenon, kredante, ke la aviadilo ne necesos; sekve, ĉiuj el la gekolegoj pereis. En foto de matura Owen, vidiĝas sur lia brusto 5 medaloj.

Geoff, filo, kun gefratoj Kerry (kiu estis dum pluraj jaroj la honora financo-reviziisto por la Esperanto Ligo de O.A.) kaj Larry, emocie panegiris sian patron, helpema, pasioplena, humila, memfida sed senpretenda, pragmata homo kiu bone kaj plene plenumis sian vivon. Kiel diris Geoff, perdis la mondo noblan homon de paco.

Owen sentis la mankon de sia kara edzino Joan post ŝia morto antaŭ kelkaj jaroj; li tenis ŝin ĉe sia koro, ĉiam. Li estis fiera patro de la tri gefiloj, kiel ankaŭ de siaj genepoj kaj pragenepoj. Li verkis memuaron por la familio.

Lia kara fratino Peggy, kiu forpasis nur 6 semajnojn antaŭ li, ankaŭ estis ano de ELOA. Kiam Peg elvenis el Londono en la 60-aj jaroj, kun bebo Rory, Owen subtenis ankaŭ ilin. Rory nun loĝas en Bostono, de kie li sendis mesaĝon -kiun legis Geoff- de amo kaj laŭdo por la kara onklo.

Arde sendependa, Owen influis multajn, redonante al la komunumo multflanke. Li fariĝis scienca esploristo en la Departamento de la Arbaro, kaj en sia libertempo interesiĝis pri kaj laboris por Esperanto, la Unuiĝintaj Nacioj, kaj la natura medio. Li traktis aliajn tiel kiel li mem volis esti traktata, ĉiam konsiderante la vivon, sanon kaj bonfarton de aliaj. Li ne estis juĝema, estis socie justa, fidinda, lojala, laborema - altruisma en ĉiu aspekto de sia vivo.

Tute male al la averaĝa ' *laid back Aussie bloke*', (leĝera aŭstralia viro) Owen estis ĉiam stabila kaj serioza. Lia alia fratino, Cath, per video el Melburno parolis pri la mankoj kaj defioj de la infanaĝo. Pro familiaj problemoj, la juna Owen, plejaĝa el kvar, fariĝis la 'paĉjo' por la plijunaj gefratoj, kaj protektanto de la panjo. Li estis kapitano de loka futbalteamo (*soccer*), kaj ankaŭ ludis la korneton kaj la francan kornon.

Lastatempe, lia memorkapablo iom post iom perdiĝis, kaj Owen fariĝis 97-jaraĝa malfortulo. La morto liberigis kaj lin kaj lian familion de plua doloro kaj malĝojo. Ni aŭskultis la kanton de John Lennon, *Imagine* (Imagu), dum ni rigardis la fotojn de nia ege respektita amiko, kiun mi persone konis ekde 1970, kiam la karmemoraj Owen Loneragan kaj Rene Smeets, kune kun mi, komencis lerni Esperanton. Dum la pasinta jardeko aŭ pli, Owen ankaŭ gastigis nin dum jarkunvenoj kaj aliaj kunsidoj, en sia domo. Ripozu en paco, kara samideano.



*Vera Payne*


***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## La kosmostacio de ĉinujo

Post ekskludo de la Internacia Spaca Stacio fare de Usono, Ĉinio sendas unuan homekipitan mision al kosmostacio Tiangong ("ĉiela palaco"), kiu, verŝajne, estus la sola en la tera orbito antaŭ la 2022a jaro



Ĉinio estos la unua kun ekskluziva stacio, promesante aliron al evoluantaj landoj.
La taikonaŭtoj, Nie, Liu kaj Tang - de kamparanaj fonoj - pasigos tri monatojn en la spaco.
Sudĉinuja Matenpoŝto 17.06.21 La Mondo de Ĉinoj 18.06.21 *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

En 2019, Usono estis la ĉefa milita elspezanto de la mondo, ĉirkaŭ $ 649 miliardoj jare. Ĉinujo estis dua je ĉirkaŭ 261 miliardoj da dolaroj jare.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Pesmismo erozias komercajn ligojn inter Ĉinujo kaj Aŭstralio

By Global Times
Published: Jun 23, 2021 09:13 PM



Illustration: Xia Qing/GT

GT Voice: Pessimism eroding China-Australia trade ties - Global Times

La civitanoj de ambaŭ landoj suferos.

Ne batalu se vi ne povus venki

Fiero iras antaŭ la falo

Nur la Ĉefministro havas la rajton decidi fari militon. Ne la parlamento

Estas grava ke Aŭstralianoj scias ke Aŭstralio povus militi laŭ la kaprico de Ĉefministro.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# NITOBE-SIMPOZIO 2021

De 1996 la Nitobe-Simpozioj kunvenigas diversajn spertulojn kaj aliajn koncernatojn, por ke ili priparolu aktualaĵojn de lingvopolitiko en internaciaj kuntekstoj. La serion oni nomis laŭ la japana internaciisto kaj diplomato Nitobe Inazō, kiu oficis kiel ĝenerala vicsekretario frue en la historio de la Ligo de Nacioj, kiam ĝi komencis studi lingvopolitikon eksplicite kaj je la internacia nivelo.

La Simpoziojn organizas la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo kunlabore kun diversaj lokaj partneroj kaj subvenciate de Esperantic Studies Foundation. Ĉi-jare ni ĝojas pro nia partnereco kun la Fako pri Aplikataj Sociaj kaj Politikaj Sciencoj ĉe la Universitato de Ulstero por esplori temon tre gravan en la kuntekstoj nord-irlanda, eŭropa kaj internacia: “Lingvoj, konfliktoj kaj sekureco”.

Kiam ajn rolas en konflikto lingvopolitiko, ĝi implikiĝas en reto de aliaj temoj, ekzemple etna kaj rasa identecoj, religio, rajtoj je tereno kaj proprietaĵo, kaj partoprenado en demokratio. Tamen, oni ofte subtaksas la lingvan flankon kaj ankaŭ la malfacilon de kompromisoj justaj kaj daŭripovaj per lingvaj aktoj kaj politikoj. La elstaraj kontribuantoj al la ĉi-jara simpozio certe iluminos pli hela ĉi tiun nemalhaveblan flankon de konfliktosolvado kaj packonstruado.

La ĉi-jara simpozio estos pro la cirkonstancoj virtuala aranĝo, kaj okazos dum du tagoj tuj post la VK - la 26-an kaj 27-an de julio. La tuta evento estas senpaga, sed nepras sin registri.

La programo estas enhave riĉa kaj prezentoj esploros kvar ĉefajn kampojn kun nuntempa graveco al la temo: Lingvopolitiko en Nord-Irlando kaj la sekvoj por la dividado de la povo en konfliktantaj socioj; Lingvo kadre de sekureco kaj konfliktosolvado en Eŭropo; Lingvo en humanecaj krizoj kaj anticipa packonstruado mondskale; kaj Antaŭenpuŝi lingvan justecon. Vizitu la retpaĝon por trovi pli da detaloj rilate la programon.

La laborlingvoj de la evento estas la angla kaj Esperanto kun samtempa interpretado, kaj ni ĝojas anonci ke interpretos por ni Duncan Charters kaj Istvan Ertl.

Prizorgas aliĝadon la Universitato Ulster kaj oni rajtas nun aliĝi.

Moderigantoj: Michele Gazzola, Angela Tellier, Mark Fettes, Humphrey Tonkin.

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## SOLVO DE LA KVIZETO 41

1). A). Adjekto (“Dum la dek minutoj”).
B). “kiuj”.
C). “la tuta torto”.

2). La predikato (= ĉi tie, verbo + predikativo).

*Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Aŭstralia spionado.

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)



**LA NELEĜA OKAZO.**

Antaŭ trideko da jaroj la aŭstralia registaro komerce intertraktis kun la registaro de Timorlesto (Orienttimoro) pri ebloj mini por petrolo kaj gaso en la maro apartenanta al Timorlesto. Kvankam la intertraktado estis inter registaroj, ĝi estis pure nur komerca.

Niaj sekurecinstancoj (*intelligence agencies*) helpas kaj respondecas al la registaro, speciale la ministro por eksterlandaj aferoj. Ilia limigita tasko estas ekzameni kaj raporti la sekurecon de la nacio. Spionado enlanda kaj eksterlanda estas unu el la helpiloj, eble la plej granda. Ili certe ne rajtas enmiksiĝi, aktive aŭ pasive, en la ekonomia vivo, do ne en la konkurenco inter komercaj societoj. Por tion ekzameni kaj reguligi la registaro havas aliajn instancojn. Se la sekurecoinstancoj agas ekster sia kampo, nur la registaro scias tion kaj devas korekti tion. Se ĝi ne korektas la misagon de sekurecinstanco, neniu scias pri tiu manko de registara bonkonduto. Same por la misuzo ate de la registaro ante la sekurecinstancoj. Tiaj misaj aŭ mankaj agoj de registaroj kreas diktatorecojn.

Antaŭ trideko da jaroj la aŭstralia registaro misuzis unu el la sekurecinstancoj, devigante ĝin spioni la registaron de Timorlesto por tiel helpi ĝin en la negocoj pri minado de petrolo kaj gaso. Normale neniu aŭstraliano ekster la speciala ministro aŭ ekster la sekurecinstanco bezonas publikigi tian misfaron. Sed la honesteco de la konscienco de unu sekurecmembro estis tro forta kaj li publike atentigis la registaron. Tia ago en si mem estas kontraŭleĝa, ĉar sekurechomo ne rajtas publikigi la agojn de la instanco. La instanco kaj la registaro zorgis ke la membro elĵetatis el la sekureco servo, kaj procesis kontraŭ li. Li nun estas malsana en malsanejo. Ĉu la registaro ĉesis sian miskonduton oni ne scias. Sed la timorlesta registaro koleris spionati de Aŭstralio kaj plendis en la internacia kortumo. Dum la honesta malsekretigulo (*whistleblower*) estis en la kortumo pro la plendoj de la registaro, lia advokato, por defendi lin, menciis pli da misfaroj en la sekurinstanco, kaj tial la registaro komencis kortumi ankaŭ kontraŭ li, kaj tio nun plu daŭras. En mia artikoleto en la ĵusa A.E. mi ne rajtis mencii la misfarojn, kaj do ne faris. Sed siatempe la ĵurnaloj faris tion, sen registara persekuto, nur averto ĉesi. Cetere ni lernas el la historio por eviti similajn erarojn.

Antaŭ dek tagoj la ĉefredaktisto de granda aŭstralia ĵurnalo iomete priskribis kio okazis en la spionadokazo kaj penis konvinki la registaron ĉesigi la persekutadon ante al la advokato, por fini la aferon. Sed la registaro aŭ/kaj la sekurecanoj verŝajne bezonas la pluan persekuton por timigi estontajn kazojn. Antaŭ kelkaj tagoj la tiutempa ministro plendis pri tio ke la redaktisto daŭrigis mencii la tiaman spionadon, ĉar "tio estas malbona propagando por Aŭstralio". Unue tio estas sensenca, ĉar la eksterlandaj registaroj kaj ĉiuj eventualaj homoj scias ĉion pri ĝi. Kaj krome li NE konsilas ke ankaŭ la registaro ĉesu daŭrigi la aferon publike per sia procesado al la advokato. Mi trovas tiun duecan rekomendon tre stranga, por paroli afable.

Sen malsekretiguloj ni neniam ekscios, se similaj misagoj de la registaro kaj/aŭ la sekurecinstancoj okazis. Ni povas nur esperi, ke KAJ la sekurecoinstancoj KAJ la registaranoj estos honestaj, kion ili ne estis en la spionadoafero.

Kiel ni lernos el la historio por eviti erarojn? *Marcel Leereveld.*

**3ZZZ..** En la elsendo de la 28a de junio 2021 vi malkovros originalan iniciaton : banko de amo .La aliaj temoj varias inter kiel scienco helpas arton aŭ kiel konatiĝi kun la homoj hazarde renkontitaj dum promenado .



Mi memorigas la membrojn de 3zzz ke la jarkunveno de la grupo Esperanto okazos vendredon la 2an de julio je la 4.00 ptm en la radiostacio , Albert Strato, Brunswick ….*Franciska Toubale*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***